

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 47-a BRAZILO. JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2022 N-ro 185

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
Zamenhof. *La Espero*.

## NENIU HAVAS ANIMON

*Jose Passini*

Ĝenerale oni diras, ke la animo survivas post la morto de la korpo. Temas pri ne adekvata diraĵo, ĉar nur survivas, tiu kiu riskis morti. Animo ne riskis morti. Ĝi estas nemortema.

Alia neadekvata diraĵo estas: “mia animo”. Neniu havas animon! Ni ĉiuj estas animoj, kiuj havas korpojn, kiujn ni forlasos post ties morto.

Ni, animoj aŭ spiritoj, estas nemortemaj! Ni uzas morteman korpon, kiun ni forlasos post ĝia morto. Post la morto de nia fizika korpo, ni, animoj, ankoraŭ konservas nian spiritan korpon.

Laŭ instruoj de Apostolo Paŭlo en la konata Letero al Korintanoj, 15:35: Sed iu diros: Kiel la mortintoj releviĝas? Kaj kun kia korpo ili venas? La Apostolo diras pri la enterigo de la fizika korpo: Ĝi estas semata laŭanima korpo, ĝi releviĝas laŭ spirita korpo. Se ekzistas laŭanima korpo, ekzistas ankaŭ laŭspirita korpo. 15:44.

Laŭ Agoj 1:3, Jesuo aperadis dum 40 tagoj, post sia morto. Ne estas referenco pri la animo de Jesuo. Sed, nur pri Jesuo. La animo estas nevidebla. La personoj vidis la spiritan korpon de Jesuo, ĉar Li ne havis plu la fizikan korpon, kiu mortis. Li uzis sian spiritan korpon, kiu permesis al Li aperi kaj subite malaperi, sed neniam plu bezonis manĝi nek gastigi en domo de iu ajn. Bedaŭrinde teologoj de pluraj kristanaj religioj nenion diras pri tiu nemateria korpo.

Sed, tiuj, kiuj pensas, ke ni estas korpoj, kiuj havas animojn multe suferas pensante pri sia morto, ĉar ili sentas, ke almenaŭ parto de si mem malaperos. Ĝenerale tiuj personoj erare diras: “Mi mortos, sed mia animo survivos.”

Pluraj personoj diras: “Kiam mi mortos mia korpo estos entombigita apud miaj antaŭuloj.” Kaj respondante la demandon: “Kien iros via animo?” La respondo ĝenerale estas: “Ĝi iros en la ĉielon!” Sed, iu grava demando stariĝas: Kiu estas la posedanto de la korpo kaj de la animo? Vi uzis du posesivojn: mia korpo kaj mia animo. Kiu estas ties posedanto? La racia respondo estas ĉe la unuaj linioj de tiu ĉi artikolo.



# ESTU HUMILAJ



**E**n granda ĝardeno elvolviĝis diversspecaj floroj kun variaj koloroj. Tie ĉio miksiĝis, estigante ian polikromion, kiu ravis la okulojn kaj ĝojigis la animojn.

El inter tiuj floroj, kaŝiĝis en la branĉaro eta kaj humila violo, tiel eta kaj humila, ke la sunradioj ne atingis ĝin.

Kvankam ĝi estis tre malgranda, ĝi gaje floradis, ĉar ĝi troviĝis for de la videmaj okuloj.



Iam, ia papilio fluganta ĉirkaŭ la floroj, ekvidis la humilan violon. Ĝin longe rigardante, la papilio diris:

— Ho! kiel eta kaj malbela vi estas! Vi tre meritas vivi inter la ŝtonoj vin ĉirkaŭantaj. Mi ne volas resti apud vi, ĉar per via koloro, vi povos neniigi la brilon, per kiu la Suno orumas miajn flugilojn. Restu tie, senbrila floro! Certe, eĉ ne dolĉan nektaron vi havas... Kial mi perdu tempon kun vi? Restu, ĉar mi foriras. Mi volas spiri la parfumon de la aliaj floroj, kiuj estas bejaj kaj vivoplenaj! Mi volas ĝui la atlasan glatecon de iliaj petaloj!

La papilio orkolora, kvazaŭ iaj sunradioj, foriris, kaj tie restis la papilio, muta kaj humila, penante plifoj ricevi inter siajn petalojn la radiojn de la Astro-Reĝo!

Tiunokte okazis uragano. La vento senigis la arbojn je iliaj folioj kaj nudigis la povrajn florojn je ties petaloj, kiuj ne plu havis sian karakterizan atlasan glatecon, ĉar la varma polvo ilin cindrigis.

Kaj la violo? Kaŝita ĉe la verda branĉaro, ĝi estis nevidata de la vento. Ĉu ĝi, tiel potenca, memorus la povran violeton? Neniam!

La uragano malintensiĝis. Tagiĝis!

La granda ĝardeno estis plenplena de tio, kio hieraŭ estis floroj, viglaj kaj bonodoraj, kaj kiuj nun estis nenio alia ol montego da petaloj premegitaj kaj polvokovritaj.

La violo, sola postvivanto de la terura ventego, ĉion rigardadis kun malĝojo, bedaŭrante la sorton de siaj kunulinoj.

Subite, jen besteto kun nigraj flugiloj, kiu rampis en la ĝardeno, alproksimiĝis al la violo. Tiu ĉi malfacile rekonis en tiu teruraspekta insekto la orkoloran papilion, kiu hieraŭ ŝvebadis ĉirkaŭ la floroj, fierega kaj orgojla je siaj oraj flugiloj!

Ho! ĉu vi ja troviĝas tie? – demandis, kun granda surprizo, la papilio. Ĉu la ventego ne forprenis vin? Ĉu la terura uragano ne disĵetis viajn petalojn?!

— Ne, – diris la violo, humila kiel ĉiam. – Ĝi ne memoris min!

— Sed min ĝi memoris... mi estas kompatinda! Kiom senkompata kaj malbona li estis por mi! La polvo en la aero bruletigis miajn belegajn flugilojn, kaj nun, kompatu min! – mi suferas malvarmon kaj ne havas lokon, kie mi povos trovi rifuĝejon... floroj estas senpetalaj... Ili estas mortintaj!...

— Venu, kara amikino, – respondis la violo, kompatema. Protektu vin en mia frondo; ennestiĝu inter miaj petaloj. Jen kion mi povas doni al vi.

Kaj la papilio, humila kaj venkita, ŝirmita inter la folioj de tiu, kiun ĝi antaŭe forlasis, ricevis, kiel ĉiam, la radiojn de la leviĝanta Suno, kaj sentis sin feliĉa.

Amikoj, vi, kiuj min aŭskultas! Ne estu kiel la papilio, fiera kaj malmodesta. Ne serĉu en la vivo-ĝardeno la iluziojn aŭ ĥimerojn, kiuj estas bonodoraj floroj, kiujn tamen la realo-vento povas facile dispeli.

Penadu fariĝi humilaj, neniam humiligante tiujn, kiuj jam estas humilaj, ĉar iam vi povos peti ŝirmadon, vi povos vidi ekaperi la Suno de l' Vero, sub la protekto de tiuj, kiujn vi malatentis!

*El la libro: "Semoj el Lumo" / Spirito: Icléia  
Mediumino: Brunilde Mendes do Espírito Santo.  
El la portugala tradukis Benedicto Silva*



| KOMUNIKOJ | Jaro 46-a  
| n-ro 185 | Januaro-Februaro-Marto 2022  
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ  
Fondita la 15-an de Decembro 1975  
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz  
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ - Brasil (Brazilo)  
+55-21-98427-8080  
Librovendejo: editoralorenz.com.br  
Retadreso: editora\_lorenz@uol.com.br  
Fejsbuko: Editora Lorenz

# LA ARTO PACE MALKONSENTI

Paulo Sérgio Viana

Laŝtatempe okazas en multaj landoj fenomeno, kiun oni devus detale pripensi. Temas pri la granda malfacileco, kiun ordinaraj homoj - foje eĉ alte edukitaj homoj - trovas, kiam ili devas teni konversacion kun aliulo, kaj subite entrudiĝas malkonsentoj. En tia situacio, eĉ okaze de banala, ĉiutaga babilado, tre ofte ekestas malkomforta sento, kvazaŭ la menciita malkonsento kaŭzus ian senton de minaco, de malamikeco, de malsimpatio. Se la konversacio enhavas konceptojn pri politiko, ĝi facile fariĝas akra baro, kiel por soldatoj en oponaj tranĉeoj. Sed ankaŭ se temas pri filozofio, religio, arto, kaj aliaj temoj.

La afero funkcias, kiel se malkonsento distancigus la du pensantajn kapojn kaj farus ilin malamikaj. Ofte lakonversacio transformiĝas en reciprokan pikadon. Estas dolore aŭdi la jenan frazon: "Mi ne konsentas!". La aŭdinto de tiu frazo ekkoleriĝas eĉ ne sukcesas plu aŭdi la kontraŭajn argumentojn. Kaj reciproke.

Jen estas la diferenco inter "dialogo" kaj "polemiko". Dum dialogo, oni simple interŝanĝas ideojn; dum polemiko, kontraŭaj, interpuŝantaj ideoj regas la interparolon, kaj unu partoprenanto klopodas konvinki la alian pri sia propra vidpunkto. Se la polemiko inkluzivas multajn personojn (en la gazetaraj paĝoj, ekzemple, aŭ en sociaj retoj), la problemo fariĝas eĉ pli danĝera kaj dorna.

Kaj tamen, polemiko estas grava elemento por pliriĉigo de la homa menso. Kiam alia persono malkonsentas kun mia opinio, jen oportuna okazo



por repensi la aferon. Kaj se mi trankvile repensas, du aferoj povas okazi: aŭ mi konvinkiĝas pri la ricevita argumento kaj ŝanĝas mian pensmanieron, aŭ mi konfirmas mian opinion, ĉar mi havas miaflanke bonan argumenton por proponi al mia kunparolanto. En ambaŭ okazoj, mi progresis en mia pensado. Kial do koleriĝi?

Kompreneble, povas ankaŭ okazi, ke ambaŭ polemikantoj elĉerpis ĉiujn siajn argumentojn, kaj tamen ambaŭ konservas siajn vidpunktojn. Kie la problemo? Ambaŭ pensis pli profunde, en sia mensa sinteno. Kial malpaci pro tio? Ne ĉiuj homoj estas devigataj pensi egale...

Fakte, nuntempe multaj homoj rezignas pri polemikado, pretekstante, ke ĝi kondukas nenien. Sed ne! Danke al sana, paca polemikado, ofte oni povas preni novajn vojojn en sia pensado, kiuj kondukas al pli saĝaj agoj. Oni devus eduki infanojn de frua aĝo pri la arto de prudenta konfrontado. Nenia honto troviĝas en la fakto, ke mi de tempo ŝanĝas mian opinion rilate iun ajn temon. Tute male! Hontinde estus neniam fari tion! Homo, kiu supozas, ke li ĉiam pravas, estas arogantulo...

## INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO "HRISTO GOROV-HRIMA" – 2022

**Hristo Gorov – Hrima** estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

*La konkurso estos por rakontoj kaj eseoj.*

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan

alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj.

*La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.*

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 31-a de oktobro 2022 al adreso: e-mail: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg) aŭ per la poŝto al adreso: **Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.**

# KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

Al s-ro R. en Borispol. (o.v. II-28)

La projekto de sinjorino Olga L. ekscitis vivan intereson ĉe multaj legantoj; sed la intereso estis, por tiel diri, pasiva kaj ne aktiva. La legantoj demandas, kio estos kun la projekto, sed preskaŭ neniu el ili donis ian precizan propran opinion pri tiu ĉi projekto. Kelkaj simple diris, ke la projekto estas ne plenumbla, dum unu el niaj plej varmaj amikoj, kontraŭe, tuj komencis la efektivigadon de la projekto kaj sendis sian subskribon kaj la subskribon de aliaj personoj, kiujn li tuj varbis laŭ la plano de la projekto. Laŭ nia propra opinio la artikolo de sinjorino Olga L. estas tre bona, ĉiuj pensoj en ĝi estas veraj kaj logikaj, sed la projekto mem estas ne efektivigebla pro jena kaŭzo: La tuta esenco de la projekto konsistas en tio, ke ĉiu „vastiganto“ devas promesi, ke li trovos du novajn vastigantojn. Sed neniu povas promesi, ke li ion trovos, ĉar la trovado ne dependas de ni; ni povas nur promesi, ke ni serĉos, sed ne ke ni trovos kvankam per si mem la trovado de 2 novaj vastigantoj estus eble afero ne



tre malfacila, tamen konsiderante, ke li eble malgraŭ sia penado ne povos ili trovi, preskaŭ neniu volos doni tian promeson el la timo fariĝi en okazo de malsukceso publika rompinto de sia vorto. Sed se en la promeso nomita en la projekto ni metos la vorton „serĉi“ anstataŭ „trovi“ aŭ „alporti“, tiam la tuta projekto perdos sian signifon, ĉar la serĉadon neniu povas kontroli. Tio ĉi estas la malforta flanko de la projekto, kaj tial, ĝis estos trovita ia rimedo por korekti tiun ĉi malfortaĵon, ni ne povas ankoraŭ preni la aferon en nian manon kaj komenci la publikigadon de la „vastigantoj“. Estus tre bone, se iu el niaj amikoj trovus ian rimedon, ke ĉiu vastiganto, en okazo se li ne trovas 2 novajn vastigantojn, povu purigi sin antaŭ la publiko per ia alia laboro egale forta, egale produktiva kaj kreskiganta kaj egale por ĉiu plenumbla; aŭ almenaŭ ke ĉiu en okazo de malsukceso havu la eblon elmontri, ke li efektive diligente kaj fervore serĉis novajn vastigantojn sed ne trovis. Kiam estos trovita tia rimedo por purigi la honoron de ĉiu diligenta sed nur malsukcesa „vastiganto“ tiam ni, sen timo fari fiaskon kaj kompromiti la malsukcesajn amikojn, komencos presadi la ĉenon de la vastigantoj, ĉar tiam nenia vera amiko timos aŭ rifuzos enskribiĝi en la nombron de la „vastigantoj“. Pli aŭ malpli frue ni revenos ankoraŭ al tiu ĉi demando. Ni estus tre dankaj al tiu, kiu proponus al ni ian bonan rimedon por korekti la malfortan flankon de la projekto de sinjorino Olga L.

**Zamenhof**

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

*Certe vi ne solvos ĉiujn problemojn de la mondo. Tamen vi povas kaj devas kontribui por ke tio okazu.*

*Se vi ne baras militon, vi havas rimedojn por eviti la maltrankviligajn diskutojn, kiuj atingas vin; se vi ne sukcesas nutri la malsategan popolamason, vi havas almenaŭ kruston de pano por donaci al iu;*

*se vi ne posedas sanon por disdoni al la malsanuloj, almenaŭ helpu unu suferanton; se vi ne solvas la homajn dramojn, kunhelpu por serenigi unu personon;*

*se vi ne havas rimedojn por estri grupojn, akcelante ŝanĝojn en la mondo, modifu vin mem interne, nobligante vin per agoj de bono kaj solidareco.*

Libro: Vivo Feliĉa

Spirito: Joanna de Āngelis

Mediumo: Divaldo Pereira Franco



**R**esurso de la Naturo signifas liberan aliron al iu ajn estulo, tio estas, komunan uzadon de ĉiuj. Valorigi ĝin kun profitodona utileco, jen nia celo precipe kiam temas pri la tuta kolektivo, ene de kiu ni troviĝas kiel filoj de la sama Patro. Facile estas percepti, ke dum vivotempestoj, kiuj pereige sukuras nian malofte travivitan fidon nekredeble malgrandan kaj anceliantan, kiom malfacile ĉi-kaze estas almenaŭ duonvidi ian "sekuran havenon"! Tiam, "Eliru do, el la tumultego, kie vi troviĝas droninta, kaj sekvu rekte al la preĝa oazo, por ke vi vin revigligu kaj vin banu en paco" (Libro: Vivo Feliĉa, Spirito Joanna de Ângelis, leciono 157, mediumo Divaldo P. Franco, Spiritisma Eldona Asocio F.V.Lorenz.) Ĝuste tial tiu ĉi natura resurso, kiu portempe nin subtenas, necesas fariĝi ĉiuokaza, sufiĉe antaŭ, ekzemple, preni gravajn decidojn en nia vivo, kio naskas kiel efikon vojiradon laŭ la fluo de la tempo kaj de la cirkonstancoj, kiam ĉio favore kaj pli glate okazos, reflekto de la Dia Volo, de la Senmezura Amo por la bonstato de ĉiuj Liaj kreitoj.

El tiu preparolata natura resurso: "Akiru la kutimon preĝi, kaj aligu ĝin al la aliaj naturaj mekanismoj de via ekzistado, kaj vi konstatos la bonaĵon de tio rezultantan." (Libro: Vivo Feliĉa, leciono 27, Spirito Joanna de Ângelis, mediumo Divaldo P. Franco, S-

piritisma Eldona Asocio F.V.Lorenz.) ĉar sendube konstateblas, ke per la preĝo fariĝas pli bonaj la homoj tial, ke tiu, kiu fervore kaj konfide preĝas, kun sincereco de pensoj, vidas sin pli forta kontraŭ la tentoj kaj la propraj malvirtoj, kio estas bazo de la individua progreso.

Malgraŭ tio, ke peti estu la pli ofta sinteno, tamen juste dezirindus ne forgesi laŭdi kaj ĉefe danki Dion kun la sama ofteco (eĉ pli...) kie en nia ĉiutaga rilato, plena de amo kaj humileco, kun nia Ĉiela Patro, ĉiam favorkora kaj kompatema.

Finfine, kio estas preĝo? Preĝo estas "... la arda alvoko de spirito al la Ĉielaj Potencoj, ĉu vestita en la vorta esprimo, ĉu tute senvorta, per la silenta vibra mesaĝo... ..En la preĝo ni disponas la plej altan sistemon de komunikiĝo inter la Tero kaj la Ĉielo." (Libro: Penso kaj Vivo, Spirito Emmanuel, mediumo F.C. Xavier, Spiritisma Eldona Asocio F.V.Lorenz.)

Ni do kutime, ĉiutage preĝu, neniam malkredante je la Dia Povo kaj kiel eble, ĉirkaŭe estigante plenan bonon laŭ niaj fortoj. Fine, mi humile parafrasas Jesuon en la Evangelio de la Sankta Mateo(18:21-22.) asertante: "Mi ne diras al vi: Ĝis sep fojoj; sed: Ĝis sepdekoble sep fojoj.", tio estas, preĝu ade kaj senlime!

## BELAĴOJ EL MIA ĜARDENO

*Jen nova rubriko de nia bulteno: "Belaĵoj el mia ĝardeno, urbo...". La ĉifoja kunlaborantantino estas Maria José, loĝanta en Rio-de-Janeiro, Brazilo. Se vi, karaj geamikoj, amas la naturon kaj zorgas pri ĝi, sendu al ni mirindaĵojn el via ĝardeno aŭ ŭrbo. Kun granda ĝojo ni ilin aperigos en nia bulteno.*



# PLI MULTE DA ESPERANTO, PLI MULTE DA PACO

Ismael Gomes Braga



**V**erdire, la mondo trairas malfacilajn ŝanĝojn, kaj la Homaro sentas la batojn, kiujn oni donas al ĝi. Stariĝas la fiera Babela turo, konfuzante la temojn pri paco kaj estigante la militajn programojn. La popoloj suferas la tiranecon de la nekomprenado, sub la humileco de la vorto, kiu proklamas la pacon en diversaj lingvoj. Tamen, en la piedestalo de la Evangelio kaj de Spiritismo troviĝas Esperanto, kvazaŭ ia lumo-flago, kunvokante la homojn por la religio de la amo kaj por la preĝo por la paco.

Ni marĉas en la direkto al la fino de iu jarcento de doloroj, suferoj kaj luktoj, post la venkado de diversaj etapoj, kun la venko de la Scienco, kiam la homo povas klarigi sian valoron kaj la apartajn kapablojn de sia inteligenteco ĉiam brila kaj progresanta, ĉar li estas filo de la plej alta Dio, kaj iras la lumo-vojon. Kaj jen tie troviĝas Esperanto, kiel beno de la Sinjoro, destinita al ia monda kunfratiĝo, kiam devos esti starigitaj sublimaj celoj

por la inteligenteco, en la estonteco.

Pro la amo al la Majstro, la homoj parolos la universalan lingvon, kunordigos la samajn temojn, plisimpligos la komprenadon kaj la komercan disvolviĝon laŭ la aŭtentika fratamo.

Tiamaniere fariĝas necese pli kaj pli intensigi la lernadon de Esperanto — la espero de la mondo por la konkero de la paco.

Ni alproksimiĝu al la junularo, ilin instigante al la lernado de la subluma idioma; al la infanoj ni parolu pri la Bona-Novaĝo de la savo, laŭ la instruado de la universala edifado; ni konsolu niajn gefratojn, instruante al ili la pacon de la Kristo per la instruado de Esperanto, por ke la mondo trairu la finon de ia jarcento ne sub la efiko de doloroj kaj kun la abortado de la propra ofendo, sed posedita de la deziro de la Dia unuiĝo de ĉiuj koroj. Nia preĝo al la Majstro kaj Sinjoro celas la faciligadon de la homaj vojoj, kaj ke la Spiritoj, kunigitaj kiel floroj de unu sama ĝardeno, aŭ kiel ŝafoj de unu sama ŝafaro, finfine trovu la pacon, paŝante de la Tero ĝis la Ĉielo, tenante la Dian flagon: Evangelion, Spiritismon kaj Esperanton. Kaj la subluma ligilo estos por la surtera Homaro la plej bela stelo brilanta sur la planeda firmamento.

*El la libro Veterano,  
tradukis esperanten Benedicto Silva.*

## **SALUTON, KARAJ SAMIDEANOJ!**

Nia laboro rilate pres-aranĝojn de belaj ĉemizoj por disvastigi Esperanton kaj Spiritismon komenciĝis en la jaro 1981, tuj post la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, en Brasília.

Ho, jes, ankaŭ estas vere pri Spiritismo, ĉar en la E-medio estas multaj samideanoj membroj kaj simpatiantoj de la Doktrino de Allan Kardec, kies bazo estas la Universala Amo.

Lazaro Zamenhof genie ellaboris la Internacian Lingvon por la Universala Kunfratiĝo.

**KARDEC kaj ZAMENHOF SENDUBE MERITAS TUTMONDAN APLAŬDON! LA TRIA GIGANTO ESTAS WALDOMIRO LORENZ.**

Elkore vin brakumas kaj kisas vian koron,



[amariliocarvalhonoel@gmail.com](mailto:amariliocarvalhonoel@gmail.com)

# ARTO DE VIVO EN PAROJ

Zbigniew Galor<sup>1</sup> - Pollando

Enladuobla mondo,

Materia-spirita.

Vivo iĝislaarto

Al paroĵdediĉita.

Nek tri, neknaŭ. Nekkvardekkajkvar.

Ĝusteladu - amata par'!

Ĝusteladu - amata par'!

Dialektikaprinĉipo:

Eternaj "pro" kaj "kontraŭ",

Ĝemelaladuopo.

Unukajunu, ne "au"..

Nek tri, neknaŭ. Nekkvardekkajkvar.

Ĝusteladu - amata par'!

Ĝusteladu - amatapar'!

Vivi en paro kun vi,

Ne sole, ne en grupo.

Ne, ne amase - despli.

Nur vi kaj mi sendubo

<sup>1</sup>Forpasinta la 27-an de januaro 2017.

El Almanako Lorenz 2017



## Konsolas rememori (Vigasztal az emlékezés)

Baldaŭ floros neĝborulo.

Jam nun la vintro forpasis.

Pli varme radias Suno.

Tiun floron ni tre amis.

Heroldoj de la printempo,

montoflanke la novaĵoj,

ridetanta nia bebo,

ilin ni ĝuis sen aĝoj.

Mia edz' pro longa sufero

ho forpasis ekripozi,

jam mi orfas por eterno

sed konsolas rememori.



(27.02.2022 Verkita en origina Esperanto)  
Adrienne Pásztor

# ELKORAN DANKON

Mi tre dankas ĉiujn gefratojn, kiuj interkruĉiĝis kun mi, kiam mi vivadis en la karna korpo.

Mi tre dankas ilin, pro la rigardoj de malestimo, kiujn ili direktadis al mi. La rigardo de malestimo al miaj mizeraj rimedoj malaltigis mian egoismon, kiam mi volis fari pli multe ol tiom, kiom mi povis.

Mi tre dankas, kiam ili kompateme rigardadis min, memorigante al mi la mildan rigardon de Jesuo, ĉe la helpado al la mizeruloj.

Mi tre dankas, kiam ili insultadis miajn etenditajn manojn, kio profunde brulvundis mian animon kaj fandadis mian memestimon.

Mi tre dankas por la panpecetoj, kiuj faladis sur la platojn de miaj etenditaj manoj, satigante min kaj garantiante al mi la ekzistadon.

Mi estas tre danka al vi, kiam vi plendprotestis kontraŭ mia agmaniero, kontraŭ mia odoro, ĉar, sentante min humiligita, mi priatentis mian konduton, laŭ mia mizero.

Mi estas tre danka pro viaj ridetoj pri miaj agmanieroj kaj, karesplene, vi min helpadis, malgraŭ la naŭzo, kiun mi kaŭzadis al la aliaj homoj.

Miaj karegaj gefratoj, miaj surteraj majstroj, mi estas tre danka al vi pro la valoraj lecionoj; elkorajn dankojn pro via vivhelpo al mi"

Sur la vojoj, kie mi vagadis, la indignosento min rondiris, kaj la hontego estis mia kunulo.

Sed la mizerikordo de Tiu, kiun ni respekte nomas Patro, — tiu mizerikordo estigis en mi la konsolon de kompatema rigardo, de la bonfarema mano kaj de la indulgema interparolo.

La ekvilibro de la peniga pruvo kaj de la patra dorloto venintaj de miaj bonfaremaj gefratoj garantiis al mi produkteman enkarniĝon.

Kun granda penado mi lernis, kaj, feliĉa, mi ekrimarkis, ke miaj fantomoj de orgojlo, egoismo, ribelemo kaj aliaj monstroj komencis esti pentritaj de la karesmaj pacienco, humilo kaj fervora fido.

Mi estas tre danka pro tio, ke mi kreis la esperon pri la estonteco.

Verŝante larmojn, mi dankas.

Larmoj, ne pro malĝojo, sed pro dankemo.

Kaj mi petas benon por ĉiuj miaj majstroj. Kaj al Dio mi petas, ke Li donu al ili la saĝecon, kiun ili havigis al mi.

Elkoran dankon! Dank' al Dio.

Dankegon.

Dank' al Dio!

Iu feliĉa almozulo.

*Spirito: Francisco*

*Tradukis esperanten: Benedicto Silva*

*Kunlaboris: Johano Marrara*

*Esperantigis: Benedicto Silva*

## AMIKOJ DE LORENZ



Elmir dos Santos Lima, kuracisto (pediatro kaj homeopato), spiritisto, estrarano de Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz (membro de la Komitato), estas fervora esperantisto, kiu naskiĝis la 14-an de januaro 1953 en Rio de Janeiro. Elmir ankaŭ partoprenas en la skipo de prelegantoj de Lorenz kaj helpas la eldonon de Almanako kaj Komuniko, organoj de tiu menciita institucio.

Kiel preleganto li partoprenis plurajn esperantajn aranĝojn.

Ekzemple li prelegis okaze de la 8-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj, en Rio de Janeiro (2015), pri la ĉefa temo de tiu evento: "Esperanto – pordo al la homa kunfratiĝo". Li prelegis ankaŭ en BEL-Konferencoj 2017, en la urbo Petrópolis, pri la temo "Meditado en la brazila Publika Sansistemo - SUS".

Li estas membro de Brazila Esperanto-Ligo kaj instruas nian lingvon ĉe Grupo Espírita Yvonne Pereira. Li estas prezidanto de União Espírita Fernandes Figueira e Bezerra de Menezes.

Li prezentas la progameron "Evangelho, Spiritismo, Esperanto" en Radio Rio de Janeiro ekde antaŭ 30 jaroj.

Elmir estas bonkora kaj tre simpatia homo.

*Kunlaboradis: Eurípedes Barbosa*

## NOVA LUMO

*Nova lumo venis al la Tero,  
Lumo sankta de la Sankta Dio!  
Disfluiĝas tute la mistero  
Sub la forto de l' Evangelio.*

*Nun la pordoj bronzaĵ de l' karcero.  
Entenantaj ombron de l' Nescio,  
Falas brue... Restas nur polvo...  
For mallumo! hela estas ĉio!*

*Vivon novan nun ricevis vorto  
De l' eterna Majstro el la forto  
De la flora lingvo Esperanto.*

*Nun popoloj ĉiuj vidos klare,  
Dion Bonan dankos, kaj grandare  
Kolektiĝos por la nova kanto!*

**Abel Gomes**  
**CARREIRO NETO, Luiz da Costa Porto,**  
**Mediuma poemaro, 1972. (FEB).**

## INSTRUOJ EL LA LIBRO DE LA SPIRITOJ



Kion ni pensu pri detruado, superpasanta la limojn de bezonoj kaj de sekureco; pri ĉasado, ekzemple, tiam, kiam ĝi celas nur la plezuron senprofite detruai? (735)

"Ĝi estas atesto pri la potenco de la besta super la spirita naturo. Ĉia detruo, transpasanta la limojn de bezonoj, estas malobeo je la leĝo de Dio. La bestoj detruas nur por siaj bezonoj, sed la homo, kiu havas liberan volon, detruas senbezone; iam li devos redoni kalkulojn pri la misuzo de la libereco, kiu estas al li konsentita, ĉar, tiel agante, li cedas al siaj malnoblaj instinktoj."

Kiu estas la kaŭzo, kiu kondukas la homon al milito? (742)



"La regado de la besta naturo super la spirita kaj la plena satigo de la pasioj. En barbareco, la popoloj rekonas nur la rajton de l' plej forta; tial, milito estas por ili normala stato. Sed, proporcie kiel la homo progresas, milito malplioftiĝas, ĉar li evitas ties kaŭzojn; kaj, kiam ĝi estas necesa, li scias kunigi kun ĝi humanecon."

Ĉu milito iam malaperos de sur la Tero? (743)

"Jes, tiam, kiam la homoj komprenos justecon kaj praktikos la leĝon de Dio; tiam, ĉiuj popoloj estos fratoj."



# CARLOS JULIANO TORRES PASTORINO

Estante pastro de la Katolika Eklezio, li tamen ekŝiĝis, kiam en 1937 li atendis ricevi de la Papo, en Romo, sian promocion al diakoneco. Tiam li surpriziĝis, kiam la Papo Pio XII rifuzis akcepti Mahatman Gandhi en lia tradicia blanka vesto. La kardinala kolegio postulis, ke la hinda estro vestu frakon, por ne rompi la protokolon de la intervjuoj de la Ŝtatestroj. Pastorino pensis, ke se Jesuo vizitus Vatikanon, li tute ne intervjuus la Papon, ĉar ankaŭ Li, certe, ne sin submetus al la Ekleziaj postuloj.

Pli vaste konata kiel “profesoro Pastorino”, li naskiĝis en la kvartalo Estácio, en Rio-de-Ĵaneiro, la 4-an de novembro 1910. Li estis filo de José Pastorino kaj S-rino Eugenia Torres Pastorino. Ek de tiam, kiam li estis eta infano, li prezentis grandan inteligentecon kaj dialvokon al la eklezia vivado. En 1934 li fariĝis pastro.

Elreviĝinta pri la Eklezio, li revenis al Brazilo kaj tie ĉi realigis intensan pedagogian laboron, kiel instruisto de latina kaj greka lingvoj, en la Itala-Brazila Instituto de Supera Kulturo.

Membro de pluraj esperantistaj societoj, en Brazilo kaj eksterlande, li estis Fakdelegito de Universala Esperanto-Asocio. En tiu aktiveco li estis fondinto de Brazila Esperanto-Societo, en Rio-de-Ĵaneiro, kaj ankaŭkreinto de instru-metodon de Esperanto per Esperanto-Asocio. En tiu aktiveco li estis

Ismael Gomes Braga  
*Esperantigis Benedicto Silva*



fondinto de Brazila Esperanto-Societo, en Rio-de-Ĵaneiro, kaj ankaŭkreinto de instru-metodon de Esperanto per radio. La 31-an de majo 1950 li finis la legadon de La Libro de la Spiritoj, kiun li prunte ricevis de iu kolego en “Kolegio Pedro II”. Je tiu dato li sin deklaris spiritisto - kaj tiun daton li tre karese konservis. Tiam li komencis vizitadi la “Spiritisman Centron Júlio César” en la kvartalo Grajaú - Centro, kiu estis lia komenca lernejo de Spiritismo. La 8-an de januaro 1951 li fondis, kun kelkaj amikoj, la Studo-Grupon Spiritus, kaj el tiu Grupo, kune kun Jaime Rolemberg de Lima, naskiĝis “Lar Fabiano de Cristo”, “Capemi” kaj la Bulteno SEI (Spiritisma Informo-Servo). Li ankaŭ fondis Livraria e Editora Sabedoria (Librovendejon kaj Eldonejon Saĝo) kaj ankaŭ la revuon kun la sama nomo (Saĝo). Li faris paroladojn pri la Spiritisma Doktrino ne nur en Ŝtato Rio-de-Ĵaneiro, sed ankaŭ eksterlande.

El lia vastega bibliografio elstaras la libro Minutos de Sabedoria (Minutoj da Saĝeco), kiu jam atingis plurajn eldonojn en diversaj lingvoj.

Li forpasis la 13-an de julio 1980, en Braziljo.



## BALTIAJ ESPERANTO-TAGO

*Povilas JEGOROVAS*

Post dujara deviga pandemia paŭzo, la 56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio la 9-17-an de Julio, 2022, ĉi-foje en Litovia havenurbo Klaipėda apud Balta Maro, en la universitato de Klaipėda.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa Bulteno pri BET-56 ĉi-tie: [sezonoj.ru/2021/08/bet-99/](https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/)  
Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie: [mallonge.net/gl](https://mallonge.net/gl)

Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo.

Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉiuj sanprotektaj aferoj por eviti pandemiajn danĝerojn.

Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto, kie estas akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo:

[sezonoj.ru/bet/](https://sezonoj.ru/bet/)

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa Servo:

[eventaservo.org/e/BET-56](https://eventaservo.org/e/BET-56)

Konstante aktualigataj ĉiuspecaj informoj pri BET-56 estas en ties retejo:

[www.esperanto.lt](https://www.esperanto.lt)

Bonvolu plani Vian partoprenon al tiu-ĉi grava internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj Vialandaj naciaj esperantistaj informkanaloj.

La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila. Partoprenu mem kaj invitu aliajn.